# *Surprize Usono ne klare respondas pri la kubaj kuracistoj forrabitaj, asertas Bruno Rodríguez*



**Foto: Radio Cadena Agramonte**

Havano, jun 13 (RHK) En la Kvaronjara Raporto pri Takso de Civilaj Viktimoj eldonita lastatempe, la Usona Milita Komando en Afriko (Africom) rekonas, ke la Armitaj Fortoj de tiu lando faris bombadon proksime de la urbo Jilib, Somalio, la 15-an de aprilo, 2019.

Tamen, la dokumento asertas, ke la atako ne ka?zis la morton de civiluloj, kaj neniu eksplicita mencio estas farita de la kubaj kuracistoj Assel Herrera kaj Landy Rodríguez.

La teksto, kiu rekonas la sendistingan uzadon de militrimedoj kontra? la civila lo?antaro, sed ne proponas ajnan klarecon pri la insulaj kuracistoj, meritis la respondon de la membro de la Politika Buroo de la Partio

kaj Ministro de Eksterlandaj Aferoj de Kubo, Bruno Rodríguez, en la socia reto X.

«La informoj publikigitaj de la usona proparolanto estas surprizaj kaj ne provizas ion novan pri niaj samlandanoj Assel kaj Landy. "Ekde aprilo ni atendas, sen respondo, demandojn, kiujn Kubo oficiale petis pri la Africom-atakoj en alia urbo en Somalio", skribis la ministro pri eksteraj aferoj.

La 12-an de aprilo, Kubo akuzis Usonon ne respondi "kun la seriozeco a? ur?eco postulata" al la petoj de Havano por klarigi la supozitan morton de la du kuracistoj kidnapitaj de Al Shabab en Kenjo.

Eviti la respondon pri tio, kio okazis al la kuracistoj, kiuj savis vivojn en afrika teritorio kaj la mankon de travidebleco en la donitaj informoj, pliigas respondecon pri la faritaj agoj.

Fonto: Granma

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/357290-surprize-usono-ne-klare-respondas-pri-la-kubaj-kuracistoj-forrabitaj-asertas-bruno-rodriguez

**Radio Habana Cuba**